

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

Oktobro 2026 / n-ro **148**



Kroatoj ĉe la 111a Universala Kongreso de Esperanto en Aŭstrio



Ivo Osibov - Honora membro de UEA



Esperanto en la zagreba Festivalo de lingvoj



La premiita libro de Sibila Petlevski traktas Esperanton

Karaj legantoj, saluton!

Niaj ejo en Vodnikova 9 ricevas novan aspekton. **Ankica Jagnjić** traktis kun **Neven Kovačić** kiu signife finance kontribuis dum ni repagadis ŝuldojn por povi aĉeti la ejon. Nun li finance helpis ĉe la farbado de la ejo kiun ni nomas „Mira kaj Mirko Manner“. Refarbata estis la grava pordo inter la du ejoj. Renovigita estas la elektra sistemo en la prelegejo. Ne plu elektraĵoj kabloj tiriĝos tra la plankoj, ni ricevis novajn konektingojn! Ankaŭ novan kranon ni ricevis en la kuirejo!

Dankon al Neven por tiu renovigo!

En somero la plej belajn momentojn ni pasigis en Graz, ĉe la 11a Universala Kongreso de Esperanto. Tie la Aŭstra UNESCO-komisiono proklamis ke Esperanto estis protektita nemateria kultura heredaĵo de Aŭstrio! Post Pollando kaj Kroatio, jen la tria lando kiu protektis Esperanton. Se ni estus pli ol tri landoj, eble ni povus ricevi la tutgloban protekton de Esperanto. Sur la titolpaĝo, fotita de John Huanh, la kongresanoj en la plej bela Zamenhof-salono en la histotio de Universalaj Kongresoj.

En Aŭstrio nia en junio forpasinta membro **Ivo Osibov** ricevis gravan postmortan rekonon. Pri ĉio verkas **Filip Ivančić**.

Josip Pleadin profitis de la fakto ke la kongreso en **Graz** gastas en la dua plej bela muzikejo de Aŭstrio. La fama Musikverien de **Vieno**, kun multaj floroj estas la scenejo, kie post la novjara nokto okazas mirinda muzikkoncerto. Per TV multaj homoj de la mondo observas kaj ĝuas la novjaran koncerton el Vieno jam de multaj jaroj. Per tiu koncerto komencas la nova jaro ankaŭ en Kroatio. La muzika ejo de Vieno estas nepre unika ne nur en Aŭstrio. La duan lokon laŭ la kvalito prenas ĝuste la salono en **Graz**, kie ni kongresis.

En 2026 **Pleadin** proponis al la organizantoj de UK ke en la

kongresa programo de UK en **Graz** gastu la muzikensemblo Golub/ Kolombo el **Bjelovar** fondita en 1887! Ni havis la okazon aŭskulti la ensemblon plurfoje sed nenim la bjelovaraj muzikistoj sonis tiel bone kiel en la potencsona muzikejo de la Musikverein Graz, respektive la belega salono Stephanie, kiun en la jaro 1895 persone malfermis la belga pincino Stephanie, vidvino de la aŭstra tronheredanto princo Rudolf.

Dokumentan filmon pri la gastado de la muzikensemblo el **Bjelovar** en **Graz** kreis **Sandi Lukić**. Tiu filma dokumento pri la bjelovara gastado en Graz estis elsendita en HRT la 20an de aŭgusto 2026 dum la elsendo Bonan matenon, **Kroatio!**

Ankaŭ nia membro **Neven Mrzlečki** muzikis por la kongresa publiko.

Grave estis ke **Ankica Jagnjić** organizis kelkajn helpantojn kiuj deĵoris ĉe la enkonduka programo al la Universala Kongreso dum la Movada Foiro. Tie estis distribuita informoj pri Esperanto en Kroatio kun invitoj por eventoj en 2027.

Spomenka Štimec prezentis omaĝan programon al **Zlatko Tišljar - Pajo** kaj la Zagreba Metodo. En la tre bone vizitata programo estis prezentita la fotoj el la vivo de **Pajo** fotitaj dum diversaj jaroj de lia vivo fare de **Ivan Špoljarec**. En la fokuso estis la filmeto pri la Zagreba Metodo, kiun kreis pluraj kunlaborantoj laŭ la ideo de **Spomenka Štimec** kaj kun la kamerao de **Branka Sacher**. La filmon sekvis la prezento de **Maja Tišljar**, la filino de **Zlatko Tišljar**, pri la posta evoluo de la Zagreba Metodo al Multlingva Akcelilo.

En Graz **KEL** ricevis gravan donacon el **Ĉinio**, kiun alportis por ni s-ino **Arko**, estrarano de UEA. Ĝi trovis la unuan eldonon de la „Konfeso“ eldonita en Ŝangajo en 1936, en traduko de **Wang Luyan**. Ĝi nun estas la granda raraĵo en nia speciala fera arkiva ŝranko! Ĝi ankaŭ trovis la represaĵon de la ĉina traduko

de „Año de l' ringludo“, kiun en 1996 kreis Ŝkolska knjiga en Zagrebo. Tiu represaĵo fariĝis la oficiala donaco de la ŝtata delegacio de **Kroatio** dum la vizito al **Ĉinio**. Kaj unu ekzemplero de la libro atingis antikvaĵejon kiun trovis **Arko!**

La 30an de julio mortis dum la feriado en Crikvenica nia membro **Stjepan Muić el Velika Gorica**.

Kroata Fervoja Esperanto-Asocio organizis la 23an de aŭgusto 2026 viziton al la tombo de **Radenko Milošević**, nia tre aktiva vicprezidanto de KEL, okaze de la 10a datreveno de lia morto.

En Rijeka **Ana Alebić Juretić** kreis plian Informilon de Rijeka, publikigita en septembro. El ĝi ni eksciis interalie ke tie mortis fidela membro **Adela Franić**.

Dum la Tago de lingvoj okazis en Zagrebo festivalo de lingvoj. Dum ĝi okazis prelego organizita de Kroata Esperanto-Ligo „Esperanto, la lingvo per kiu vi ricevas amikojn“. Prelegis **Zeljka Bradić** en Prva gimnazija en Avenija Dubrovnik 36. La prezento de Esperanto okazis la 25an de septembro 2026.

Alvenis surpriza pakaĵo el **Koreio** kaj en ĝi du raraj tradukoj: *Ano de l' ringludo* de **Dinko Šimunović** tradukita en la korean per la Esperanto-eldono. La tradukisto estis **Ombro**. Li tradukis ankoraŭ unu verkon *Konfeso* de **Milka Pogačić**, eldonita en Esperanto de **Antoniya Jožičić** en Kostajnica en la jaro 1913!

Kial Ombro nun post 110 jaroj elektis tiun verkon por koreigo? Ha, li aŭskultis ĉe Ĉina Radio iun intervjuon kun **Spomenka Štimec** kaj iris serĉi la librojn por vidi kial Ĉinoj tion ŝatis traduki... Se havas Ĉinoj, havu Koreanoj! Interese, ĉu ne?

Al tiuj eldonoj estas dediĉita la unua prelego en aŭtuno 2026 en Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“, la 14an de septembro.

Bonan legadon!

S. Štimec

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj. Jaro XLVII (47), numero 1478(2/2026) ISN 2991-194X. Sona numero 66/2026.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj de 2022 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.

La reta versio de Tempo ĉe: www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Tempo estas eldonita per la financa kontribuo de Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikiloj.

Redakcio / Uredništvo; Eldonisto / Nakladnik: Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Ana Alebić-Juretić, Veronica Alzate, Božidar Brezinščak Bagola, Darija Budiša, Zdravko Budiša, Ana Ĉumbelić-Roesum, Nataša Dorosulić, Stanislav Frančišković-Bilinski, Zlatko Hinšt, John Huanh, Ankica Jagnjić, Filip Ivančić, Ombro, Ivan Špoljarec, Olga Štajdohar-Paden, Slavica Štefić, Spomenka Štimec, Božica Trnka, Gong Xiaofeng (Arko)

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Sur la titolpaĝo: Partoprenantoj de la 11a UK en Graz. Fotis John Huanh





Multnombra delegacio de esperantistoj el Kroatio – 16 esperantistoj kaj muzikistoj el Bjelovar – partoprenis la 111-a Universalan Kongreson de Esperanto (UK 2026) en Graco. La proksimeco de la kongresurbo certe influis la nombron de kroatoj, kiuj kontribuis en la kultura kaj arta programo.

En la parto dediĉita al omaĝo al gravaj esperantistoj de la movado, Spomenka Štimec parolis pri Zlatko Tišljar, liaj ideoj en la kampo de klerigo kaj precipe pri la Zagreba metodo de Esperanto-instruado. Ŝi ankaŭ prezentis filmeton pri tiu metodo. La salono Dobrynski estis plenplena dum la omaĝo al tiu grava esperantisto.

Alia kroata esperantistino, Marija Belošević, kune kun Barbara Pietrzak el Pollando, partoprenis en la Kleriga lundo per prelego: Radioelsendoj en la daŭra servo al la Esperanto-movado kaj komunumo. Ŝi ankaŭ, kiel kutime, zorgis pri la lerneja tago kaj pri la meso.

Krom la tre bela Nacia vespero, en kiu estis prezentita aŭstra muziko kaj dancoj, la Kroata metiista kaj laborista kulturarta societo *Golub (La Kolombo)* el Bjelovar prezentis *Kroatan muzikan bukedon*. La orkestron gvidis dirigento Goran Kruno Kukolj, kaj du elstaraj kantistoj, Helena Tabar kaj Sani Lukić. Ili prezentis kantojn el diversaj partoj de Kroatio kaj kelkajn el Bosnio kaj Hercegovino.

Estas interese, ke la societo estis fondita en la sama jaro, kiam aperis Esperanto – 1887. La organizanto de tiu evento estis Josip Pleadin.

Ankoraŭ unu muzikisto aperis en la muzika programo de la kongreso – Neven Mrzlečki, lingvisto kaj kantisto, membro de la Zagreba Opero. Krom eroj de klasika muziko, li kantas ankaŭ popularajn kaj popolajn kantojn. Tial lia programo prezentita dum la UK en Graco nomiĝis *Kantoj kroataj kaj internaciaj en Esperanto*.

Konklude, mi povas diri, ke la malgranda kroata nacio faris grandan kontribuon al la UK 2026 en Graco.

Ana Alebić-Juretić



Koncerto de la Kroata metiista kaj laborista kulturarta societo *Golub (La Kolombo)* el Bjelovar. Fotis Ana Alebić-Juretić



Spomenka Štimec prelegas pri Zlatko Tišljar dum la UK 2026 en Graco. Fotis Ana Alebić-Juretić

Parto de la kroata grupo revenas per trajno kun novaj geamikoj el Kubo, Aŭstralio kaj Kanado. Fotis la biletkontrolisto



Rimarkinda kunlaboro inter la Esperantista Asocio de Bjelovaro kaj HORKUD "Golub"

(Pri tio ĉi sciigis Super retejo – 6a de Aŭgusto 2026)

En kunlaboreco kun la Societo de Esperanto-anoj de Bjelovaro, la tamburorkestro HORKUD 'Golub' lastatempe plej bone prezentis sin mem, la Urbon Bjelovar kaj Kroation ĉe la 111-a mondkongreso de esperantistoj, okazinta de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto en Graz, la ĉefurbo de la aŭstra provinco Stirio. Dank' al la engaĝiĝo de la esperantistoj de Bjelovaro, la organizantoj de la kongreso inkluzivis la prezenton de la tamburistoj 'Golub' en la oficialan programon. Laŭ la invito, la orkestro okazigis unu-horan koncerton titolitan 'Kroata muzika bukedo', dum kiu ili prezentis kolekton de famaj malnovaj urbaj kantoj, ĉefe en tradukoj al Esperanto, parte ankaŭ en la kroata lingvo, kun kelkaj instrumentaj eroj.

Koncerto okazis en la impona konstruaĵo Congress Graz, situanta en la urbocentro, proksime de la urbodomo. La iamaj konstruaĵoj de la Ŝtjaraŝteda banko, konstruitaj fine de la 19-a jarcento, inter 1977 kaj 1980 estis transformitaj en modernan kongresan centron. Ĝia centra salon Stefaniensaal, nomita laŭ Princo Stefanie de Belgio, edzino de heredo-Rudolfo, filo de imperiestro Franjo Jozefo, gastigis ankaŭ muzikistojn el Bjelovar. Kvankam membroj de HORKUD „Golub” antaŭe jam prezentis esperante kaj kelkaj membroj kunigas ilin kun tiu lingvo kaj la riĉa historio de la asocio, ĉi tiu koncerto estis speciala sperto pro la internacia kaj tre diversspeca publiko. La prezento en la reprezentativa halleto, konata pro sia elstara akustiko, estis unu el la plej signifaj koncertaj spertoj por la orkestro.



La koncerto okazis la 3-an de aŭgusto en la posttagmezo. Eĉ se ĉe la sama tempo okazis pluraj kongresaj programoj, la halo kun kapacito de preskaŭ mil lokoj estis sufiĉe plena. La dudek-muzikista orkestro estis gvidata de la direktoro kaj muzikisto Goran Kruno Kukolj, kiu multe penadis en la preparojn. Rimarkindajn prezentojn faris ankaŭ la voĉaj solistoj Helena Tabar kaj Sani Lukić, sukcese kantante verkojn en ĝis nun al ili nekonata lingvo – Esperanto. La programon gvidis prof. Zdravko Seleš, kaj la publiko plurfoje rekompencis la prezentantojn per longdaŭra aplaŭdo. La prezento ankaŭ malfermis eblecojn por estontaj internaciaj kunlaboroj, pri kiuj oni ekscios pli en la venonta periodo.

Al konantoj de la historio de HORKUD „Golub” bone konata estas, ke inter elstaraj membroj de la asocio estis ankaŭ respektataj esperantistoj, inter kiuj speciale elstaras la komponisto Ivan Barešić kaj la muzikinstruisto Dragutin Štokić. Prezenta simbolo havis la komenco de la koncerto per la prezento de la originala marŝo „Esperantista Stevo”, kiun Ivan Barešić komponis en 1952 honore al tiam ĉi-prezidanto de la bjelovaraj esperantistoj Stjepan Maltar. La verko dum jarojn preskaŭ estis forgesita kaj nekonata al la granda publiko, sed en la lastaj jaroj ĝi denove estas inkludita en la regulan repertuaron de la bjelovaraj tamburistoj. La realigo de ĉi tiu projekto ebligis danke al la subteno de la Urbo Bjelovar, Bjelovara-Bilogora distrikto, la Monda Asocio de Esperantistoj (Universala Esperanto-Asocio) el Roterdamo, Kroata Esperanto-Ligo kaj Ante Mlinar el Zagrebo. Ilia financa kaj organiza subteno estis grava kondiĉo por la sukcesa plenumo de ĉi tiu internacia gastado.

Ivo Osibov - Honora membro de UEA

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio en la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz elektis novajn Honorajn Membrojn de la Asocio. Krom sep vivantaj membroj la titolo de la Honora Membro postmorte estas aljuĝita al antaŭ nelonge forpasintaj esperantistoj Hans Michael Maitzen el Aŭstrio kaj Ivo Osibov el Kroatio. Osibov forpasis la 10-an de junio ĉi jare, kaj UEA decidis honorigi lin por lia longjara nelacigebla agado je promovigo kaj instruado de Esperanto. Li esperantistiĝis en 1952 en la aĝo de 15 jaroj, kaj jam sep jarojn poste li ekplenumis gravajn funkciojn en internaciaj esperantistaj organizaĵoj. Li estis, interalie, prezidanto de TEJO, komitatano de UEA kaj ĝenerala sekretario en la estraro de UEA. Krom tio ĝi senlace laboris je promovigo de Esperanto en Kroatio kaj en la mondo, instruis Esperanton kaj varbis novajn membrojn al Esperanto-movado. Osibov tiel krom Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Emilija Lapenna kaj Zlatko Tišljar fariĝis la kvina esperantisto el Kroatio, al kiu estis aljuĝita ĉi tiu titolo.



*Ivo Osibov (2001).
Fotis Ivan Špoljarec*

Filip Ivančić

Ivo kaj mi

Esperanton mi lernis kiel studentino. Denove mi komencis lerni ĝin tridekon da jaroj post miaj studentaj tagoj. Tio estis en la jaro 2014 (aŭ 2015?) en Esperanto-Societo „Split“, kiu tiam uzis belajn ejojn de la distrikto Lovret en la urbo Split (ĉar siajn ĝi ne posedis). Tiam mi unuafoje rekontiĝis kun sinjoro Ivo Osibov.

Nome, nia instruisto de Esperanto estis emerita juristo kaj profesoro, magistro pri juro, granda esperantisto el Split, sinjoro Ivo Osibov. Ĉiuj aliaj, same kiel mi, estis iel „komencantoj“ ĉar ni, post grandega paŭzo, forgesis bazajn sciojn de nia internacia lingvo. Li tiel, kompreneble, instruis nin ekde la komenco. Post la kurso, en kiu ni lernis uzante la lernolibron „Esperanto“ laŭ la zagreba metodo, ni daŭrigis en progresiga kurso. Tiam nia instruisto donis al ni specialajn interesajn tekstojn, zorge preparitajn por ke ni lernu pli da novaj vortoj kaj la pli kompleksan gramatikon. Tiuj kursoj okazadis unufoje semajne dum du horoj. Ni paŭzis nur en la jaro dum la kronvira epidemio.

Multon mi lernis de mia kara profesoro Ivo, ne nur pri la lingvo sed ankaŭ pri la Esperanto-movado, pri kiu li multe parolis kaj montris al ni per videoprojekcioj. Tiel mi eksciis kiom granda kaj entuziasma esperantisto li estis, kaj pri liaj gravaj funkcioj en la monda esperanta movado. Li ĉeestis en preskaŭ ĉiuj esperantaj kongresoj, kune kun sia kara edzino Katja.

Ivo estis „la vivanta enciklopedio“ de Esperanto kaj li ĉiam volonte helpis al mi kiam mi „blokiĝus“ en tradukado. Tiel li ankaŭ provlegis kaj korektis mian unuan dulingvan libron, la bildlibron „Magična igra / Magia ludo“. Li ne estis iu strikta instruisto sed li ofte ŝercemis laŭ sia propra maniero. Kun ni li ankaŭ societumis dum niaj ekskursoj, kiujn ni organizis ĉiujare post niaj kursofinoj.

Li mankos al ni, samkiel lia granda scio de

Esperanto. Mankas al ni ankaŭ liaj ŝercoj. Jam al mi mankas mia kara instruisto, granda sinjoro kaj esperantisto. Mi dŭrigas tie kie li finis kaj nun mi instruas aliajn en nia societo.

Dankon por ĉio, kara nia Ivo!
Ripozu en paco!

Darija Budiša



*Ivo Osibov dum la solena kunveno okaze de la 100 jaroj de la organizita E-movado en Split, Urba Biblioteko, 2022.
Fotis Zdravko Budiša*



Du kroataj libroj en la korea - tradukitaj per Esperanto

Ombro-Jang, la korea tradukisto, publikigis en sia revuo TERanidO ke en Seulo en septembro 2026 aperis du kroataj libroj tradukitaj koreen per Esperanto. La libroj aperis ĉe la eldonejo Azaleo, en Seulo, kie li jam publikigis tri tradukojn de la verkoj de Spomenka Štimec en la korea „Tilla“, „Hodler en Mostar“ kaj „Kroata Milita Noktlibro“.

Nun li publikigis pliajn du verkoj el malnova kroata literaturo „Konfeso“ de Milka Pogačić, tradukita en Kostajnica en 1913 de Antonija Jožičić. Aldone „Ano de l' ringludo“ de Dinko Šimunović tradukita el

Esperanto de D-ro Fran Janjić. Ĝi aperis en Leipzig en Germanio ĉe la eldonejo Ferdinand Hirsch und Sohn 1926. La ĉinigon prizorgis Ŝi Fang Si por la ĉina eldonejo Ŝangiru en Ŝangajo.

Kial Ombro-Jang nun koreeigis tiujn malnovajn kroatajn verkojn? Ili aĝas pli ol cent jaroj!

Li aŭskultis Ĉinan Radion, Esperanto-Fakon, intervjuon kun Spomenka Štimec, kiu elsendis informojn pri ligoj inter la kroata literaturo kaj la ĉina. Li iris serĉi librojn pri kiuj li aŭdis en la intervjuo!

Dankon, Ombro-Jang ke vi legas, aŭskultas kaj transdonas tion pri kio vi eksciis – koreen!



Spomenka Štimec

Tre valora libro en nia biblioteko


Ni ricevis donace por nia biblioteko la libron de Dinko Šimunović „Alkar“ (Ano de l' ringludo) en la ĉina, tradukita el Esperanto kaj publikigita en Ŝanhajo en la jaro 1936! La donacinto estas estraranino de UEA D-rino Gong Xiaofeng el Ĉinio kiu lastjare vizitis Zagrebon kaj nin, konatiĝis kun nia biblioteko kaj komprenis kio estas grava por ni.

Ŝi tiun valoran malnovan ekzemplon aĉetis en

ĉina antikvaĵejo kaj donacis al ni.

Ŝi ankaŭ aĉetis la zagreban represaĵon de tiu libro, faritan de la eldonejo „Školska knjiga“ kiun la delegacio de la Kroata Parlamento portis donace al Ĉinio en 18 ekz. En speciala skatolo kun la kroata ŝtata blazono ĝi estis aparta donaco. Sed evidente iu vendis ĝin al antikvaĵejo, provizante ĝin per la ĉinlingva noto: „Donaco de la kroata delegacio!“ Tiun ekzempleron ni transdonis al Kroata Ŝtata Arkivo je granda kontento de ricevintoj.

Spomenka Štimec



D-rino Gong Xiaofeng - Arko en Graz



Adriatika Feriado sur insulo Prvić

La 3-a Adriatika Feriado sur insulo Prvić

La tria Adriatika Feriado okazis de la 21a ĝis la 29a de junio 2026. Kiel atendite, plej multe da partoprenantoj estis el la Kroatio, sed estis ankaŭ ses eksterlandaj esperantistoj el Italio, Germanio kaj Ukrainio. Ni venis el direkto de Zagrebo, Split, Zadro kaj Šibenik. Poste per ŝipo al la celo. La gastigantoj en la feriejo Požega estas malfermkoraj Slavonianoj. Ni dankas ilin pro la zorg-libera feriado. Dum la tuta restado ni havis nek streson nek perdojn. Estis nur okazo memori karajn esperantistojn kiuj per sia dediĉita laboro inspiris nin junulojn pluiri laŭ la starigitaj direktiloj.

Kun granda ekscito ni atendis la someran feriadon. Ĝi estas loko kie ni povas paroli unu kun alia en la lingvo kiun ni amas kaj kiun ni ĝojas uzi kun pli aŭ malpli de kompetenteco en komunikado. Nia plej juna partoprenantino estis Lilijan (3 jara). Pri ŝi validas tiu malnova ŝerco “tiom eta kaj jam parolas esperanton” kaj je surprizo de multaj oni sciis ke ŝia gepatra lingvo estas esperanto.



Ni estis en la feriejo kiu proponis kelkajn nivelojn de servo. Por tiuj kiuj ne frostemas estis etaĝo pli proksima al la suno. Sed kiam la temperaturoj altiĝis ĝis 36°C, oni ne povis ricevi helpon de klimatizilo.

Ni vivis kun la naturo ene de protektaj bariloj. Ni naĝis sekure sen iri for de la bordo, sen abruptaj movoj aŭ minacoj al marveturiloj. Ni zorgis unu pri la alia tiel ke neniu iam estis sola, por eviti malagrablaĵojn aŭ timon en neatenditaj situacioj. Nia kunestado abundis je grupaj konversacioj (ekz. pri la ukraina lingvo) kaj ni ĝuis diversajn tabloludojn. Dum la nia restado al la feriejo alvenis du grupoj da infanoj kies familioj ne havas sufiĉe da monrimedoj. Ni povis, almenaŭ per ekzemplo, montri al ili bildon de harmonio kaj komuneco.

Nataša Dorosulić / Ankica Jagnjić



La 4-a Adriatika Feriado sur insulo Prvić en junio 2027

Mediterraneo kaj Kroatio kia ĝi estis plus Esperanto

Prvić estas insuleto en Kroatio, proksime al Šibenik. Trankvila oazo por ripozo, sen automobila trafiko, ankoraŭ ne infektita per amaturismo.

Jam kvaran jaron sinsekve kroataj esperantistoj organizas komunan somerumadon en la malgranda hotelo ĉirkaŭita de pinarbaro kaj situita tuj apud la plaĝo. La hotelo estas modesta sed konvena por grupoj. En hotelo funkcias manĝejo kaj kafejo.

La antaŭajn tri feriadojn organizis DEC el Đurđevac, kaj ĉi jare la organizadon interkonsente transprenis Kroata Esperanto-Ligo.

Al Prvić Luka regule trafikas ŝipoj el Šibenik kaj Vodice kiuj regule atingeblas per busoj de Zagreb kaj de Zadar. La plej proksima fluhaveno estas en Zadar.

La provizoraj prezoj por la semajna restado estas ĉ. 350 eŭroj en du-tri litaj kaj ĉ. 450 eŭroj en unulita ĉambro. La precizaj prezoj estos konataj en la januaro 2027.

Laprezoinkluzivas: tranoktadon, matenmanĝon kaj tagmanĝon, partoprenon en programoj, viziton al Muzeo de Faust Vrančić, asiston pri aliaj organizaj bezonoj (alveno kaj reveno, ekskursoj ktp.)

Aliĝoj (nur kun la antaŭpago de minimume 100 eŭroj po persono) al: **somero@esperanto.hr**

Pliaj informoj: **www.esperanto.hr/wp/somero**

La organiza teamo

Fotis Ivan Špoljarec



La Kroata instrua filmeto pri la Zagreba Metodo en Ĉinio kaj en UK en Graz, en Aŭstrio



Branka Sacher proponis ke ni faru filmon. Por la temo ni elektis Zagreban metodon de Esperanto-Instruado. La filmeton kreis Branka, aktorino Veronica Alzate (Kroatio/Kolumbio) kaj Eric Nsabiye (Burundo). Pri la Zagreba Metodo en la filmeto parolas Spomenka Štimec kaj Ivan Špoljarec. Sian unuan lanĉon la 17-minuta filmeto havis en Internacia Konferenco de Esperantaj Instruistoj ĉe la simpozio „Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti esperantan kulturon“ kiu okazis en Ĉinio ĉe la Zaozhuang Universitato de la 10 ĝis la 13a de julio 2026. Jen la diplomo pri la prelegado per filmo dum la Simpozio, adresita al Spomenka Štimec, kiu iniciatis la gastadon de la programo, sen persona ĉeesto.

La prezento de la filmo okazis ankaŭ ĉe 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz (Aŭstrio) la 3an de aŭgusto 2026, kadre de la omaĝo al Zlatko Tišljarić, kiun prezentis Spomenka Štimec.

Spomenka Štimec



Esperanto en Festivalo de Lingvoj en Zagreb



Ĉefa Direkcio por Skriba Tradukado kaj la Re prezentantaro de la Eŭropa Komisiono en Kroatio organizis popularan Festivalon de Lingvoj, ĉi-foje en nova loko – en Unua Gimnazio en Zagreb la 25-an de septembro 2026. Tio estis la kvara eldono de la Festivalo, en kiu kutime partoprenas ambasadejoj, kulturaj institutoj, fakultatoj, mezlernejoj, tradukistoj kaj aliaj lingvaj fakuloj, verkistoj kaj multaj aliaj gastoj. Malgranda kaj kuraĝa teamo gvidata de Željka Bradić ankaŭ prezentis temon *Esperanto – lingvo kun kiu vi ankaŭ gajnas amikon*.

A.J.



Mia somero

Kvankam mi laboris ĉi somere, mi havis tempon por pluraj aventuroj.

En junio, mi iris al la insulo Cres kaj partoprenis en konkurso pri kostumoj. Mi kreis propran dezajnon de La fungo kaj gajnis la unuan lokon en la kategorio de originalaj dezajnoj.

En julio, mi iris al Milano por koncerto de muzikbando kiun mi amas, *System of a Down*. Ĝi estis tre longa vojaĝo ĉar mi veturis per nokta buso, sed la koncerto estis nekredebla.

En aŭgusto, mi iris al Dugi Otok kaj partoprenis foiron, vendante miajn kreaĵojn kiujn mi kroĉetis. Ankaŭ mi povis naĝi en la maro.

La tempo flugis, kaj nun mi estas en Zagreb, laborante plentempe.

Veronica Alzate



La novigo de la fasado de la domo en Vodnikova 9

La urbo Zagrebo organizis la purigadon de la fasado en la domo en Vodnikova 9, kie estas la sidejo de Kroata Esperanto-Ligo! La granda laboro komenciĝis la 6an de julio 2026.

Fotis: Slavica Štefić, Olga Štajdohar Pađen



Danko al Ruža Tišljar



Fotis I.Š.

Pro ŝanĝo de la leĝo kaj nepra enkonduko de E-fakturoj ekde la jaro 2027, Kroata Esperanto-Ligo devas engaĝi administran oficejon kiu gvidu librotenadon estonte. Tial ni adiŭas de nia librotenistino Ruža Tišljar kiu dum multaj jaroj zorgis pri la jarbilancoj de Kroata Esperanto-Ligo.

Kara Ruža, multan dankon al vi pro ĉio!

La oficejo kiu transprenis la zorgon pri la librotenado de KEL estas *Vaуда* el Zagreb.

S.Š.

Tombo de Ivo Lapenna en Kopenhago

Granda kroata esperantisto D-ro Ivo Lapenna ankaŭ ĉi-jare havis specialan „Salonon Lapenna“, kadre de la 111a Universala Kongreso de Esperanto en Graz. En la salono Lapenna estis la kongresa libroservo. Multaj kongresanoj eniris tien por elekti novan libron por si. Kaj jen kiel aspektas la tombo de D-ro Lapenna en Kopenhago.

Fotis Ana Ĉumbelić-Roesum



59a PIF - PREMIO “Tibor Sekelj”



La 59a Puppteatra Internacia Festivalo - PIF, kiun en 1967 lanĉis Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb, okazis inter la 11a kaj la 17a de septembro 2026 en la organizo de Kultura Centro Travno (antaŭe Internacia Kultura Servo) el Zagreb. En la premikonkura programo partoprenis 13 teatroj el Ĉeĥio, Francio, Hispanio, Italio, Kroatio, Serbio, Slovakio, Slovenio kaj Urugvajo.


La unikan teatran premion “Tibor Sekelj”, por la teatraĵo kun la plej homama mesaĝo, ricevis teatro Deraïdenz el Avignon (Francio) por la teatraĵo *La lasta tago de Pierro*. La teatraĵo estas por plekreskuloj kaj ĝi montras emociojn de la ĉefrolulo kiu dum sia agonio vivigas la plej feliĉajn momentojn de sia vivo.

I. Š.

Sceno el la teatraĵo *La lasta tago de Pierro*. Fotis Ivan Špoljarec



Nova libro de Sibila Petlevski traktas Esperanton!



Sibila Petlevski, la kroata verkistino, ricevis ĉi-jare la gravan kroatan literaturan premion „Ksaver Šandor Gjalski“ por sia romano „Spiritoj de la tero“. En la verkoj la heroinoj estas konataj junaj virinoj de la zagreba kontraŭfaŝisma Movado Rajka Baković kaj Zdenka Baković (1917-1941) murditaj de ustaŝoj en la policejo. (Zdenka post la martirado saltis de la 3a etaĝo de la policejo kaj surloke mortis.) La fratinoj naskiĝis en Bolivio, en Oruro, kien la familio elmigris el Braĉ. Revene al Jugoslavio la fratinoj gvidis la tabakvendejon, en la strato Nikolićeva 7, kiu estis grava renkontejo de la zagrebaj maldeskruloj.

La urbo Oruro gardas memoron pri ili, en la nomumo de la strato. En Zagrebo staras monumento al ili ĉe Prolaz sestara Baković. Zdenka estis aktiva membro de Akademia Esperanto-Klubo Zagreb.

En la verko Esperanto ludas gravan rolon kiel la lingvo en kiu parolas la akuzita Zdenka kaj ŝia krimexploristo. Malofte Esperanto estas je la flanko de aĉuloj... pli ofte ĝi kondukas al pozitiva kvalito de parolantoj.

La romano kunligas Bolivion kaj Kroation.

S. Ŝtimec

*Strato/Calle Rajka Baković, Oruro, Bolivio, 1984.
Fotis Ivan Špoljarec*



Prelego pri Esperanto en Maljunula hejmo

Nia membro Nevenka Imbert grave kulture aktivas en sia alta aĝo. Ŝi invitis prelegon pri Esperanto por siaj kolegoj en la klubo „Tin Ujević“ de la maljunula domo sur la zagreba Placo de Penkala, la 24an de septembro 2026. La aŭskultantoj bone amuziĝis.

Fotis Božica Trnka



Aŭtuna foliaro

Sur la dorsa flanko de Tempo vi legos la dulingvan aŭtunan saluton per *Aŭtuna Foliaro*, la poemo de fama hungara Esperanto-poeto **Julio Baghy** (1891-1967).

Tiun belan poemon el la originala Esperanto-literaturo metis en la fokuson hungara esperantisto **Istvan Szabolcs**, organizante ĝian tradukojn en 43 lingvoj. Li bindigis ilin sub unu kovrilo. La verko estas proviziita per enkonduko *Pri la esperanta literaturo* el la plumo de serba esperantisto **Zlatoje Martinov**.

Szabolcs planas eldoni la verkon sed ankoraŭ ne solvis financadon.

Intertempe la verko veturas tra la mondo... Ni prezentas al vi la kroatan paĝon de la verko. La poemon kroatisis Božidar Brezinščak Bagola.

S.Š.

Legu dorsflanke >>>

Vizito al la tombo de esperantisto Radenko Milošević, dek jaroj post lia morto

La 23-an de Aŭgusto 2026 estas la dekjara jubileo la morto de elstara kroata esperantisto Radenko Milošević. Kroata Fervojista Esperanto-Asocio alvokis por viziti la tombon okaze de la datreveno de la morto. Venis ses esperantistoj. Zlatko Hinšt parolis pri membroj de KFEA kiuj estis entombigitaj en Mirogoj (Josip Zupanić, Veljko Šegrc, Velimir Lukež, Franjo Šlabek, Ana Medić), kaj parolis pri aliaj esperantistoj, speciale pri tiuj kiuj en la jaro 2026. havas jubileajn datrevenojn de la naskiĝo aŭ morto (Mavro Špicer, Dušan Maruzzi, Ivo Lola Ribar, Ante Ferencić). Josip Pleadin parolis pri siaj vizitoj de tomboj de aliaj esperantistoj tiutage.



Radenko Milošević, 1997.
Fotis: Ivan Špoljarec

Radenko Milošević estis diplomita inĝeniero de geofiziko kaj magistro de ekonomikaj sciencoj. Zlatko Hinšt parolis pri biografio de Milošević kaj memoris lian laboron pri Esperanto, speciale pri tempo kiam li estis prezidanto de Zagreba Esperanto-Ligo (ZEL) kaj de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj li laboris en eldonado de iliaj gazetoj (Zelano kaj Zagreba

Esperantisto). Li fondis Kroata-n Esperantista-n Unuiĝo-n (KEU), sed poste li direktiĝis al laboro en Kroata Esperanto-Ligo (KEL) kie li estis vicprezidanto. Radenko preparis ankaŭ nuntempan eldonon de gazeto „Kroata Esperantisto“ kiel organo de KEU. Milošević estis meritoplena pri la starigado de memortabulo sur domo kie estis la sidejo de agado de Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj (UKE). Tiun asocion fondis Mavro Špicer en la jaro 1908, kaj redaktis tie en la jaroj 1909-1911 gazeton „Kroata Esperantisto“. Multe helpis en tiu laboro Danica Bedeković Pobjenička. En la jaro 2007. Milošević multe laboris al preparo de festo de Centjariĝo de Esperanto en Kroatio kaj Simpozio „Esperanto kaj kroata kultura identeco“, ambaŭ eventoj okazitaj la 2008 en Zagreb sub aŭspicio de prezidento de Respubliko Kroatio Stjepan Mesić. Pri kunlaboro kun Milošević parolis Josip Pleadin, elstariginte lian monan kontribuon (li elspezis ĉ. 200 mil kunaĵoj / pli ol 26 mil da eŭroj por eldonado de gazeto „Zagreba Esperantisto“).

Zlatko Hinšt

HALKA BILINSKI (1938–2025)

Aŭtune pasintjare, la 27-an de novembro 2025, post mallonga malsano, forlasis nin mia patrino, Doktorino Halka Bilinski, dum multaj jaroj membro de KEL. Ŝi naskiĝis en Sušak (Rijeko) la 21-an de marto 1938, kaj pasigis la plej grandan parton de sia vivo en Zagrebo, kie ŝi diplomiĝis pri fizika kemio ĉe la Fakultato de Scienco kaj Matematiko en 1961, kaj en la sama jaro ŝi eklaboris ĉe la Instituto Ruđer Bošković en Zagrebo. Ŝi doktoriĝis ĉe la sama fakultato en 1964.

Halka interesiĝis pri Esperanto en sia junaĝo, laŭ instigo de sia patro Stanko, fama profesoro pri matematiko kaj akademiano, kiu estis unu el la unuaj esperantistoj en Kroatio, kaj jam en la 1920-aj jaroj li ĉeestis kurson de Esperanto en Vinkovci. Kiel sciencistino, Halka multe vojaĝis dum sia vivo kaj pasigis longajn periodojn eksterlande – Usono, Svedio kaj Svislando. Dum sia restado en Kalifornio, ŝi interrilatis kun tieaj esperantistoj kaj ĉeestis tieajn kunvenojn kaj prelegojn.

Stanislav Frančišković-Bilinski



STJEPAN MUIĆ (1943–2026)

En Crikvenica mortis la 30an de julio 2026 esperantisto Stjepan Muić el Velika Gorica. Li estis profesia lekciisto. Pri matematiko kaj fiziko li specialiĝis jam junaĝe. Estis membro de Studenta Esperanto-Klubo kaj fidelis al Esperanto ĝis sia morto. Li aŭtoris plurajn fakajn lernilojn pri matematiko kaj fiziko, Zbirka rješениh zadataka za prijemne ispite. Membris en Esperanto-Klubo „La Mondo de la Paco“ en Velika Gorica.



Fotis I.Š.

DARKO BAN (1957–2026)

La 26-an de julio 2026 subite forpasis Darko Ban, multjara esperantisto el Vrbovec. Li estis aktiva membro de Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb kaj de ĝia Drama grupo. Li estis unu el la kunfondintoj de Esperanto-Societo *Granda Espero* en Vrbovec kaj redaktoro de ĝia informilo *GE*.



Fotis I.Š.

IŠ



Julio Baghy

AŬTUNA FOLIARO

Foliaro, flirte danca,
en koloroj centnuanca,
prujnmordite ventpelate
ŝvebas ĉie, kampe, strate:
jen kuniĝas, jen dissaltas,
tie sinkas, tie haltas
por susuri, sible plendi,
jen funebre por silenti,
poste supren, ek pro blovo,
sed sencele kaj sen povo
ĝis ĝi ĉesas kirle krozi
kaj ariĝas por ripozi,
kuŝi kiel morta garbo
sub soleca seka arbo.



Julio Baghy

JESENSKO LIŜĈE

Liŝĉe pleŝe na sve strane,
bojama svim obasjane,
umiveno hladnim vjetrom
zabavlja se njivom, sjetvom;
niti sije, niti ŝanje,
zapiĉje o gusto granje,
ne ŝali se, samo ŝuti,
ne zna kamo vode puti
kamo gore, kamo dolje
nema u njem ĉvrste volje,
ne moŝe baŝ niŝta reĉi,
valja njemu mirno leĉi
prije nego zora svane
ispod neke suhe grane.

*El Esperanto kroatigis
Boŝidar Brezinŝĉak Bagola*